Suplemento de "La Juna Penso", nº 82 A, februaro 1972.

# MANIFESTO por PLUVIVO de l' HOMO

La hodiaŭaj homoj pli kaj pli ekkonscias, ke la tuta homaro aktuale estas minacata en sia ekzisto mem.

La ĉefa danĝero konsistas en la senpripensaj aplikoj de l'sciencaj kaj teknikaj malkovroj. Tiu danĝero des pli gravas, ke ĝi koincidas unuflanke kun "demografia eksplodo" kaj aliflanke kun la konstanta manko de psika maturo, kiun montras la sinteno de tre multaj adoltoj.

Rezultas de tiu situacio, ke la industriaj ruboj kaj la nocaj ĥemiaĵoj disvastiĝas kaj amasiĝas sur la tuta terglobo, poluciante la vivfontojn mem: aeron, akvon , teron. Ĉie la vegetalaro regresas antaŭ la betono.Tutaj animalaj specioj estas detruitaj aŭ malaperantaj.

Al tiu ĝenerala difektiĝado de l'biosfero ofte aldoniĝas por la Homo la teruraj efikoj de l'venenaĵoj, kiujn li rekte konsumas kun la nutraĵo, la toksaĵoj kaj eĉ iuj medikamentoj, sen paroli pri la multaj agresoj - i.a. la bruo - fare de artefarita medio, kiun li kreis al si.

Ĉiuj ĉi eksteraj kaj internaj perturboj - al kiuj ne eblas adaptiĝi - rezulte atencas al la vivkvalito,naskas t.n. degenerajn malsanojn, estigas fizikan kaj moralan defalon, kies efektoj fariĝas pli kaj pli katastrofaj.

Konsciante pri tiu situacio, la subskribintoj de ĉi Manifesto kontraŭstaras tiun perspektivon de memdetruo kaj asertas sian firman decidon lukti por protekti la kondiĉojn necesajn al la vivo kaj pluvivo de nia specio.

Ili konsideras, ke la nunan situacion, kiel ajn grava ĝi estas, oni povas korekti, kondiĉe ke urĝege realiĝu unuanimeco pri la kvin jenaj punktoj:

1) la starigo de nova civitismo, kiun ni povus nomi "tutplaneda" kaj kies bazo estus solidarsento al ĉiuj "Teranoj" kaj ĉies ekkonsciiĝo pri la propraj respondecoj.

2) la tutmonda interkonsento de ĉiuj terpopoloj, por ke la energion kaj la egajn kapitalojn aktuale dediĉitajn

al armilaroj oni anstataŭe uzu plejeble rapide por lukti kontraŭ la polucioj kaj por plibonigi la vivkvaliton por ĉiuj.

3)la revizio de niaj konceptoj pri la ekonomia kaj socia vivo laŭ la ekologia situacio, cele al starigo de socio, kiu estus reale je la servo de l'Homo kaj en kiu la strebado al monprofito dependus de la kriterio pri nenoceco.

4)la kreo de Supera Konsilantaro por Pluvivo, konsistanta el la reprezentantoj de ĉiuj gentoj de la Tero, kaj kies vivon kaj agadon inspiris sincera sento pri plena homsolidaro. Tiu Konsilantaro devus ludi ĉe ĉiuj registaroj de l' planedo konsultan rolon kaj eĉ arbitracii okaze de konflikto.

5)la edukado de infanoj bazita sur la respekto al Naturo kaj Vivo, la kono de l'leĝoj de sana vivo, la disvolviĝo de la krekapabloj. Ĉar la ĉefa celo de tia edukado estas formi individuojn ekvilibrajn kaj feliĉajn vivi.

La subskribintoj de ĉi Manifesto invitas ĉiujn, kiuj konscias pri la nin minacantaj danĝeroj, kunlabori por la plenumado de tiuj kvin kondiĉoj de pluvivo, kaj devontigas sin laŭeble mem kontribui al tio. Cetere, ili opinias, ke la hodiaŭaj homoj jam aprobas, en si mem, tiujn kvin punktojn kaj ke eble sufiĉus demonstri tion por estigi decidan psikan efekton, kiu ja povus signi la deirpunkton de nova orientiĝo: ne plu direkte al la degenero sed al la konservado kaj la florado de l'Vivo.

Ĉar mondskala referendumo aktuale estas nerealigebla,ili proponas:

1) kiel eble plej larĝe disvastigi ĉi Manifeston, kun akompano de intensa subskrib-kampanjo;

2) iniciati Tutmondan Tagon por Pluvivo, ĉiujare celebrotan la unuan dimanĉon de l'Printempo kaj kiu devus okazi unuafoje la 26an de marto 1972 (por la norda hemisfero,komprene eble. - Trad.noto)

3) adopti, okaze de tiu Tago, konvencian signon por ebligi al ĉiuj, kiuj, aprobante la ĉefajn principojn de ĉi deklaracio kaj ŝatante la vivon, firme decidis lukti por ĝia kontinueco, manifesti tion publike kaj laŭ konkreta maniero. Por tiu cirkonstanco, tiu konvencia rekonigilo povus esti verda flago aŭ simpla verda ŝtofpeco, kiun oni lokus ĉe sian fenestron, sian balkonon, ĉe la radioantenon de

de sia aŭtomobilo, en la montrofenestron de sia magazeno. La verdon oni povas konsideri samtempe la simbolo de Naturo kaj de nia espero pri pluvivo.

Sammomente ekante en urboj kaj kamparoj, kaj disvolviĝante dum la tuta semajno antaŭ la Tago por Pluvivo, tia operacio de ĝenerala "verd-elmeto", tiel spektakla kiel simpla kaj facile realigebla, ebligus al ĉiuj ekkonscii pri la vastega unuanimeco de niaj aspiroj. Nia volo vivi kaj protekti la vivon de nia posteularo tiel estus firmigita kaj ni eble fine kapablus preni sur nin nian estonton !

La nin minacantaj danĝeroj koncernas nin ĉiujn.
Ni unuiĝu kaj eklaboru por ilin forpeli !

> Se ni ne forigos la poluciojn, estos ili kiuj forigos nin.

.................................................................

Klarigoj de la tradukinto-dissendanto:

Jam pluraj artikoloj informis en "La Juna Penso" pri la kampanjoj de la movado "Batalo POR la Homo" , iniciatita en Francio far Georges Krassovsky. Tiu movado proponis i.a. tutmondajn agadtagojn por la Paco (kiuj efektive jam okazis en marto '70 kaj marto '71) kaj por Savi la Naturon (en junio '70 kaj junio '71), sed la lingvaj malhelpoj kaj ĉefe la manko de rilatoj kun la aliaj mondpartoj, do de koordino kun samcelaj movadoj kaj unuopuloj, estas gravaj malfacilaĵoj.

Kiuj, pli ol ni esperantistoj, konscias pri tiuj malfaciloj ? Kaj kiuj pli ol ni tenas inter siaj manoj la rimedon por ilin venki ?

G. Krassovsky mem - kiu bedaŭrinde ne uzas Esperanton - agnoskas ĝian valoron, ĵus skribante jenon pri la ĉi-supre prezentita Manifesto:
"Mi opinias, ke estus eksterordinare bona afero, se iuj E-istoj povus iniciati Tutmondan Tagon por Pluvivo en diversaj landoj de l'mondo."

Kaj, mi aldonas, ĉu tio ne estus bona afero ankaŭ por Esperanto mem ?

Ĉu ni, LJP-legantoj, estos tiuj Esperantistoj, kiuj, unuafoje konkretigante en la ĉiutaga vivo niajn belajn dumkongresajn rezoluciojn, kontribuos veki en la tuta mondo ekkonscion pri la plej urĝa problemo el ĉiuj tempoj, tiu, kies solvo kondiĉas ĉiujn aliajn: la pluvivo de nia specio ?

Kiel uzi la Manifeston ?

Mi sugestas, ke ĉiu ricevonto ĉiarimede sed urĝe diskonigu ĝin ĉirkaŭ si, tradukinte ĝin en la nacian lingvon kaj, ricevinte la listojn de l'subskribintoj, kunlabore organizu kun ili la kampanjon por "Pluvivo de l' Homo" en la propra urbo, eĉ regiono.

Ĉi-sube modelo, kiun, post traduko, ĉiu povos uzi por kolekti la subskribojn de la ricevantoj aprobantaj la kampanjon. Antaŭvidu malsupre de la folio lokon por la mencio: "Nepre resendu la liston al la loka peranto por tiu kampanjo", kun via persona adreso aŭ tiu de loka komitato tiucele kreita.

Subskrib-folio

La personoj, kies nomoj, adresoj kaj subskriboj troviĝas sur ĉi tiu listo legis la Manifeston por Pluvivo de l'Homo, aprobas ĝin kaj deziras ricevi informojn pri tiu kampanjo.

| Nomo | Adreso | Subskribo |
|---|---|---|
| | | |
| | | |

Ne hezitu peti pliajn "Manifestojn" kaj pliajn informojn al la jena adreso: C.Baudé, F 47 - Laroque-Timbaut.

Kiuj scipovas la francan, tiuj rekte rilatu kun:
Comité pour la Promotion de la Journée Mondiale de Survie, 7 rue Boucicaut, F 75 - Paris 15, Francio.

Gérant & imprimeur: Baudé,47-Laroque-Timbaut. CPPAP 39863.